

22a ORDINARA DIMANĈO 28a de aŭgusto 2016

**ĈIU, KIU SIN ALTIGAS, ESTOS HUMILIGITA;
KIU SIN HUMILIGAS, ESTOS ALTIGITA.**

Komento al la Eangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 14, 1.7-14

En tiu tempo, kiam Jesuo eniris sabate en la domon de grava fariseo por manĝi, oni Lin observis.

Rimarkinte, ke la invititoj elektas la ĉefajn sidlokojn, Jesuo diris parable: „Kiam vi estas invitita al iu edziĝa festo, ne celu la ĉefajn lokojn, ĉar eble, iu pli honorinda ol vi, estis invitita; kaj la edzo, kiu invitis vin, devos tiukaze diri al vi: ‚Cedu lokon al ĉi tiu!‘ Tiam vi iros kun honto al la lasta loko. Sed kiam vi estas invitita, iru sidiĝi en la lasta loko; kaj tiel, kiam alvenos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi: ‚Amiko, venu pli antaŭen.‘ Tiam vi havos honoron antaŭ ĉiuj, kiuj sidas kun vi. Kaj memoru: ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita; kiu sin humiligas, estos altigita.“

Poste Jesuo diris al tiu, kiu Lin invitis: „Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku amikojn, fratojn, parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn; ĉar ili havos eblecon inviti vin siavice. Tiamaniere vi jam ricevis rekompencan. Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn. Tiam vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin; sed vi havos de Dio rekompencan fine, kiam la justuloj reviviĝos.“

Triafoje, kaj lastafoje, Jesuo manĝas ĉe fariseo, unu el tiuj piuloj, altrangaj religiuloj. Kaj ĉiufoje, kiam tio okazas, tio estas kaŭzo de konflikto.

Kaj ĉi-foje la konflikton kaŭzis Jesuo, ĉar inter la invititoj estas malsanulo, kaj Jesuo demandas, ĉu oni rajtas lin kuraci sabate, do en tago tute dediĉita al ripozo.

La fariseoj ne respondas. Do Jesuo insistas, nomante ilin hipokrituloj, kaj *"diris parabole... al la invititoj, ĉiuj fariseoj: „Kiam vi estas invitita al iu edziĝa festo, ne celu la ĉefajn lokojn, ... ,ĉar eble, iu pli honorinda ol vi, estis invitita. Tiu ekzemplo de vanteco, de deziro montri sian gravecon per sidado en la ĉefaj lokoj, kiun Luko riproĉas, estis ekzemplo jam konata de la Malnova Testamento (Prov 25, 7) proksimume per la samaj vortoj "kaj la edzo, kiu invitis vin, devos tiukaze diri al vi: ‚Cedu lokon al ĉi tiu!‘ Tiam vi iros kun honto al la lasta loko. Sed kiam vi estas invitita, iru sidiĝi en la lasta loko." Sed ni ne miskomprenu la instruon: ne temas pri humileco, sed pri amo al tiuj, kiuj estus postrestintaj: Jesuo renversas la valorojn silente akceptitajn, kaj la sidloko ne montru la prestiĝon, sed estu donaco. "... kaj tiel, kiam alvenos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi: ‚Amiko, venu pli antaŭen.‘ Tiam vi havos honoron antaŭ ĉiuj, kiuj sidas kun vi.. : ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita; kiu sin humiligas, estos altigita".*

Jesuo igis sin la lasta, li metis sin ĉe la flankon de la forpuŝitoj, de la forlasitoj: kaj per tio li deklaras, ke tiuj, kiuj igas sin la lastaj estas kunaj kun li, kundividas kun li la plenan dian econ; tiuj, kiuj volas sin montri superaj kaj sin apartigi de la aliaj, tiun komunecon ne ĝuas.

Sed la instruado ne estas finita. Mankas la parto plej grava. *Poste Jesuo diris al tiu, kiu Lin invitis:... „Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku amikojn, fratojn, parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn; ĉar ili havos eblecon inviti vin siavice." Ĉi tie Jesuo faras gravan admonon, kiun oni komprenas rigardante la socion, kiu sin kuntenas per ligiloj de amikeco, de parenceco, de intereso, kiuj konsistigas koteriojn ekleziajn kaj religiajn, kiuj subternas sin reciproke kontraŭ la aliaj. La admono estas severa kaj aktuala.*

"Tiamaniere vi jam ricevis rekompencan." Do inter la fariseoj li kritikis la tia farisea sistemon. "Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, (kiuj ne povas redoni ion interŝanŝanĝe), kriplulojn, lamulojn, blindulojn (tiaj homoj, pro malsano ne rajtis frekventi la templon, nek iĝi pastroj). Tiam vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin; sed vi havos de Dio rekompencan. Ankaŭ la justuloj ricevos sian rekompencan. Fine, kiam la justuloj reviviĝos (do ne tuj). Do ankaŭ la justuloj estas feliĉaj, ". "